
Prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org
novembro-decembro 2011, n-ro 11-12 (1277-1278)

# Sennaciulo

## Venonta kongreso en Jalto




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

## Bonvenon en Jalto!

Jalto estas ĉefa urbo de suda bordo de duoninsulo Krimeo, aŭtonoma respubliko de Ukrainio. De nordo ĝin ŝirmas kontraŭ ventoj montoj, de sudo varme karesas Nigra Maro. Ĝi estas la plej granda kaj prestiĝa ripozurbo de Ukrainio, centro de perklimata kuracado.

Krimeo estas vera histori-arkeologia konservejo. Grekoj kaj romanoj, gunoj kaj bizantianoj, genuezanoj kaj turkoj alvenadis kaj lasis tiun ĉi teron. Kontraŭ ili batalis taŭroj, skifoj, slavoj.



Jalto estas unu el luliloj de la tutmonda E-movado. En 2012 okazos 120-jara jubileo de Esperanto en Jalto. Tie ĉi loĝis famaj E-pioniroj: d-ro I. Ostrovskij, N. Borovko, A. Ĉajkovskaj. En centro de la urbo estas du memortabuloj omaĝe al ili.

La kongreso okazos en ripozejo je nomo de Anton Ĉeĥov – fama rusa verkisto, kiu fondis ĝin, loĝante en Jalto. La kongresanoj loĝos en aparta 3-etaĝa domo, kiu situas en granda ombra parko kaj havas 100 lokojn. En la domo ĉiuj ĉambroj estas 2-litaj kun oportunaĵoj (sed duŝejo kaj necesejo en unu ejo). Duono de la ĉambroj estas kun vastaj balkonoj. Kosto de unutaga restado (loĝado, 3-foja manĝado (ankaŭ kun dieta manĝado), kuracado) en 2-lita ĉambro estas 25-28 euroj por ĉiu el du loĝantoj. Kaze de unupersona loĝado en 2-persona ĉambro la kosto estas ĉ. 40 eŭroj.

En unua kaj tria etaĝoj estas vestibloj (je 20-25 personaj kunsidoj), en 3-a etaĝo estas aromoterapia ĉambro por 15-persona kunsido kaj samtempa aromoterapio, halo por kuraca gimnastiko, ankaŭ uzebla por kunsidoj. Krome apud la domo estas kelkaj lokoj, uzeblaj por la ripozo aŭ kunsidoj. Vespere eblos organizi lignofajron en apuda fermata loko.

En la ripozejo estas konferenchalo kun aparataro por koncertoj, projekciilo kaj ekrano, kie ĉiuj kongresanoj povas kolektiĝi. Ĝi estas por ĉ. 100 personoj. En la ripozejo estas kurac-diagnoza centro pri nespecifaj malsanoj de pulmoj, kormalsanoj, periferia nerva sistemo. Kuracado senpaga.

En la programo estas multaj ekskursoj kaj turistaj marŝoj. Fakte la ekskursoj komenciĝas jam de stacidomo en ĉefurbo Simferopolo al Jalto. La tutan vojon (80 km) eblas veturi per trolejbuso.

Bonvenon al senviza Ukrainio!

# Enhavo

85-a SAT Kongreso en Jalto – 2011 Aŭg. 11-18 ... 2
Frontartikolo ... 4
SAT-aj Diversaĵoj ... 7
Pliaj raportoj pri Sarajeva SAT-Kongreso ... 8
LEA-oj aktivas ... 9
SATeH kaj la anarkisma movado: fruktodona agado ... 9
Koreaj kaj japanaj SAT-anoj – Historio, Agado kaj Projektoj! ... 10
Atomcentralo estas malamiko de la tutmonda popolo ... 10
SAT vivas, debatas agadas ... 12
Kial japanoj ne ekpanikis? Kion tio signifas? ... 12
Por mutualigi la rimedojn kaj pliefikigi nian agadon ... 13
85-a SAT Kongreso – Provizora Programo ... 17
Pacista Frakcio ... 21
Sekvo de la Kongreso en Sarajevo ... 21
Ĉielarka Frakcio de SAT ... 22
Ni Marŝis ĈIELARKE – Raporto de La 15-a Ĉielarka Marŝo en Sapporo, Japanio ... 22
Indignado antaŭ la Eŭropa Centra Banko ... 23
Esperanto: ĝiaj efikoj kontraŭ cerbo-difektiĝo ... 25
Pliaj raportoj pri Sarajeva SAT-Kongreso ... 26
La Post-Kongreso en Hercegovino ... 26
SAT kulturas ... 27
Ĉu dio povas aliĝi al SAT? ... 27
Friedrich Nietzsche ... 29
Ekzistas multaj stultuloj (pli malpli) feliĉaj 30
Esperantaj tekstoj de Malatesta serĉataj por lia plena verkaro ... 31
Karmen – Kvara Parto ... 32

**★★★Lastminuta komuniko de PK★★★**

La PK akceptis la demision de Jakvo Schram la 11-an de decembro 2011. La nova konsisto ĉe la pariza prefektejo, aperas en la ĉi apuda kolofono. Tiu ĉi gazet-numero entenas referendumilon. Ne forgesu uzi ĝin por elekti la novan PF-on, kiu ekfunkcios la 1-an de marto 2012.

## Praktikaj informoj

Sennaciulo estas oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT: 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: + 33.9.50.71.01.97

Retadreso: satesperanto@free.fr

Retejo: http://satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

## Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo

Sekretario: Tereza Sabatier

Kasistino: Franjo Lévêque-Provost

Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent

## Sennaciulo

Ĉefredaktanto: Robin' Beto

Enpaĝiganto: Pierre Soubourou "Ŝtonĉjo"

Ceteraj redaktantoj: Kreŝo Barkoviĉ, Nikolao Gudskov, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale.

Kontribuojn sendu elektronike al:

sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paperpoŝte al SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate – Bimestriel.

Directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono: France 57€, autres pays / aliaj landoj: demander le tarif à notre agent du centre de SAT / peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépôt légal à la date de parution: N°CPPAP 0515 G 86567

# Frontartikolo

## Sennaciulo... plia epizodo

Jakvo Ŝram decidis rezigni pri la ĉef-redaktado kaj enpaĝigo de nia revuo. Post lia decido, la diskut-listo de la Redakta Skipo restis dum kelka tempo silenta, ĝis kiam iu el ni tutsimple demandis al la ceteraj: 'Nu, kion kaj kiel ni faru?' La demando estis prava... Espereble la respondo evidentiĝos kiel same prava. Ĉiukaze, ni daŭrigis la laboron per la nun disponeblaj rimedoj. Pro tio, vi supozeble trovos diferencojn kun la pasinta numero: la enpaĝiganto ŝanĝiĝis, kaj same la teknikaj rimedoj. Ĉi tiu numero sendube ne reprezentas kion SAT povas plej bone produkti, sed ankaŭ sendube ĝi ne reprezentas kion SAT povas plej malbone produkti.

Vi tenas numeron, kiu reprezentas la nunan SAT-on, kaj pri ĉi tio mi deziras aparte saluti la laboron, kiun Jakvo faris dum sia sindediĉa periodo: starigon de skipo de redaktantoj laboranta en reciproka fido, modernigon de la enpaĝigo, perretan dissendon de la revuo, ktp. Kaj estas en tiu kunteksto, ke mi akceptis transpreni la redakto-kunordigon, kun celo plifortigi la kunlaboron en la skipo per elekto de taŭgaj iloj. Tiuj taŭgaj iloj estas iloj, kiuj ne plu apartenas al aŭ estas regataj de unu homo aŭ de alia, sed de la tuta skipo, kio ebligos pli facilajn person-ŝanĝojn en la skipo (ekzemple ni estas elprovantaj viki-sistemon por kunlabore redakti la artikolojn, kaj la redaktejo nun disponas je unu ret-adreso, kiu apartenas ne al iu skipano, sed al la tuta skipo – sennaciulo.redaktejo@gmail.com). Mia celo estas ke ni sukcesu organizi la laboron por ke multaj homoj povu partopreni diversgrade en tiu laboro, kaj ke sekve la laboro kiel eble plej malmulte dependu de apartaj personoj. Ni vidos kion ni atingos...

Kaj kompreneble, la ideo, ke nia revuo devas evolui al ĉiam pli da kvalito enhava kaj aspekta, restas en la centro de niaj ambicioj. Sennaciulo ne estas nur montro-fenestro de SAT, ĝi estas ankaŭ vera informilo entenanta enhavoriĉajn artikolojn. La tuta redakto-skipo invitas SAT-anojn kaj abonantojn kontribui al sia revuo, ĉu verkante artikolojn, ĉu sendante fotojn, ĉu esperantigante alifontajn artikolojn, ĉu petante kontribuon al sia plej baro kiu havas ion interesan por rakonti, ĉu proponante sin por kunordigi tem-dosieron, ĉu alportante kritikon, ĉu proponante ion neimageblan... ★

*Robin' BETO*

## *Sennaciulo redakta skipo*

Demandoj, petoj, artikoloj,
fotoj, informoj, reagoj, skribu al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com

### Kotizoj kaj abono

| Lando | Prezo |
|---|---|
| Argentino | 27 EUR |
| Aŭstralio | 52 EUR |
| Aŭstrio | 52 EUR |
| Belgio | 52 EUR |
| Bosnio-Hercegovino | 10 EUR |
| Brazilio | 22 EUR |
| Britio | 45 GBP |
| Bulgario | 12 EUR |
| Ĉeĥio | 20 EUR |
| Ĉinio | 45 CNY |
| Danio | 52 EUR |
| Estonio | 12 EUR |
| Finnlando | 52 EUR |
| Francio | 52 EUR |
| Germanio | 52 EUR |
| Hispanio | 40 EUR |
| Hungario | 12 EUR |
| Italio | 50 EUR |
| Israelo | 32 EUR |
| Japanio | 7 150 JPY |

| Lando | Prezo |
|---|---|
| Kanado | 81 CAD |
| Koreio | 33 EUR |
| Kroatio | 12 EUR (90 HRK) |
| Latvio | 12 EUR |
| Litovio | 12 EUR |
| Malagasio | 5 EUR |
| Meksikio | 15 EUR |
| Nederlando | 52 EUR |
| Norvegio | 52 EUR |
| Pollando | 12 EUR |
| Portugalio | 30 EUR |
| Rusio | 12 EUR |
| Serbio | 12 EUR |
| Slovakio | 12 EUR |
| Slovenio | 12 EUR |
| Svedio | 52 EUR |
| Svisio | 79 CHF |
| Ukrainio | 12 EUR |
| Usono | 74 USD |
| DUMVIVA MEMBRECO | 1 300 EUR |

La kotizo estas pagenda al la poŝtkonto n-ro 1234-22 K, Paris, aŭ al la Landa peranto de via regiono. Pli da detaloj, vidu: http://satesperanto.org/SAT-Kotizo.html